Kaj vi? Kion vi faras?

En via grupo, uzu la subajn demandojn.

1 Ĉu vi legas librojn?
2 Ĉu vi legas multe da libroj aŭ malmulte da ili?
3 Ĉu vi legas ĵurnalon?
4 Ĉu vi legas ĵurnalon ofte aŭ malofte?

5 Ĉu vi parolas angle iomete?
6 Ĉu vi parolas hispane?
7 Ĉu vi parolas esperante bele kaj bone?
7 Kiom da lingvoj vi scipovas?

8 Ĉu vi fumas?
9 Ĉu viaj patro kaj patrino fumas?
10 Ĉu vi skribas leterojn por viaj geamikoj?
11 Ĉu vi skribas ofte aŭ malofte?

12 Ĉu vi skribas per la dekstra mano aŭ per la maldekstra?
13 Ĉu vi skribas kutime per krajono, per bulkrajono, per skribmaŝino, aŭ per komputilo?
14 Ĉu vi dormas multe aŭ malmulte?
15 Ĉu vi dormas nokte aŭ tage?

16 Kiom da horoj vi kutime dormas?
17 Ĉu vi bone dormas, mezbone dormas, aŭ malbone dormas?
18 Ĉu vi trinkas ruĝan vinon?
19 Kion vi trinkas por la matenmanĝo?

20 Kion vi trinkas por la tagmanĝo?
21 Kion vi trinkas por la vespermanĝo?
22 Nun, relegu la demandoliston. Mi dankas al vi!

* *Bona ideo: Ne forgesu lerni la novajn vortojn hejme antaŭ la leciono!!*